# EKO 2021
## Esperigaj Komunikoj

Je via servo tra ok jaroj, depost 2013
2020: rekorda jaro: kun 60 komunikoj
Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado

EKO 2021-35 sendita el Budapeŝto la 22an de aŭgusto

*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Kun plusendoj pli ol 2000.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

# Nova estraro en TEJO

Tiu nova estraro de nia junulara organizo deĵoros ekde la 1a de septembro, unu jaron ĝis simila dato en 2022. La nova kaj malnova estraroj oficis kune depost la Kongreso de TEJO (IJK) por faciligi la transdonon de taskoj. Efektive nur du estraranoj oficas tra la du jaroj 2020-2022.




La mallonga deĵorperiodo malfaciligas kontinuecon, sed pli-malpli necesas pro la egaj vivo-ŝanĝoj endemiaj en la aĝo-gamo de TEJO-aktivuloj.

La bildo apude venas el Facebook.
https://www.facebook.com/tejoesperanto/

La oficiala retejo de TEJO ankaŭ montras la malnovan estraron, en loko nefacile trovebla. Brava la uzo de sociaj medioj, kiun TEJO bonege faras, sed gravas ĉiam prizorgi senprokraste la oficialan retpaĝon: tejo.org.

EKO faras klopodojn krei kompletigan prezenton de la nova estraro de ILEI, kiu ja deĵoros tri jarojn. Ni komunikis la nomojn tuj kiam elektitaj: tio aperis en EKO 32. Nun ni ege strebas akiri la task-disdividon kaj la nunajn loĝlandojn.

## Nova lernojaro tujas – lernilo ekstreme mult-lingva

Mia lernolibro "Esperanto per rekta metodo" jam aperis en 45 lingvoj: la angla, araba, armena, bulgara, ĉeĥa, ĉina, dana, finna, franca, germana, greka, hinda, hispana, hungara, indonezia, internacia, irlanda, islanda, itala, japana, korea, kroata, kurda, latina, latva, litova, luksemburga, nederlanda, norvega, persa, pola, portugala, portugala (brazila), rumana, rusa, serba, slovaka, slovena, sveda, taĝika, taja, tajvana, turka, ukraina kaj vjetnama.

Stano Marĉek

## Plia lerneblo por Afriko

Kadre de tiu kampanjo mi kreis grupon fejsbukan kaj en ĝi neesperantistoj informiĝas pri nia lingvo. Mi donas lecionon kaj atendas komentojn de la grupanoj. Jen la ligilo al la grupo:

https://m.facebook.com/groups/207711651190719/?refid=27.

Mi devus aldoni: en la vilaĝo Shanje (Ŝanĝe), en Suda Kivuo mi kreigis klubon nome Esperanto-Klubo de Shanje. Ĝia prizorganto estas parenco, frato Chancelier kiun mi instruis pri Esperanto dum sia vizito ĉe ni en 2015. Mi donis al li lernolibron kaj nuntempe li aktivas en tiu vilaĝo kadre de Esperanto, multaj kolegoj liaj kaj eĉ lia edzino skribas al mi fejsbuke en Esperanto. Pri aliaj paŝoj mi raportos kiam estos klara efektiviĝo. Se vi volas kuraĝigi Chancelier, skribu al li: chancelierabiru@gmail.com.

Joel Muhire

## ILEI aktivigas sin tra Sud-Ameriko

La asocio de Rio (AERĴ) antaŭlonge organizas eventon por instruistoj en la ŝtato Rio de Janeiro. Ĉi-jare ili decidis fari virtualan eventon kaj invitis min kunorganizi ĝin. Komence ĝi estus nur por brazilanoj, sed poste eniris la organizadon homoj el Argentino kaj Venezuelo. Tial ĝi fariĝis Sud-Amerika.

https://www.aerj.org.br/verso

Mi invitas vin partopreni la 1-an VERSo-n. Ni havos 4 prelegojn kaj debaton pri la ĉeftemo: 'Esperanto-instruado antaŭ kaj post la pandemio.' Pretiĝas videeto por diskonigi la eventon, sed oni jam povas aliĝi senpage.

https://eventaservo.org/e/1a-verso

**Kiam?** La 28-an de aŭgusto (sabate), de la 16-a ĝis la 21-a horo UTC (13-a ĝis la 18-a horo laŭ brazila horo). Por aliro, klaku ligojn!

Aristophio Andrade Alves Filho, sekciestro de ILEI en Brazilo

## IKEF aldonas novan filion en Vjetnamio

La komerca fako de UEA (IKEF) nun malfermis filion en Vjetnamio. Tiu estas konsiderata unu el la rapide evoluantaj landoj en la mondo. Laŭ statistikaĵoj, la lando ankoraŭ akiris pozitivan rezulton en sia ekonomia kresko lastatempe. Tamen, negativaj influoj de la pandemio sur la vjetnama ekonomio estas neeviteblaj. Krom ekonomio, vjetnamaj esperantistoj ankaŭ multe aktivas en la Esperanto-movado.

IKEF-Vjetnamio estis fondita por oferti kunlaboron al eksterlandaj esperantistaj kaj ne-esperantistaj komercistoj kiuj deziras investi kaj fari komercojn kun vjetnamoj.

La 25an de julio 2021 okazis la 26a DK (Dimanĉa Kunveno) de IKEF kun 32 parto-prenantoj el Brazilo, Ĉinio, Irano, Kanado, Mongolio, Nepalo, Turkio, Pakistano kaj Vjetnamio. Post sia enkonduka parolado s-ro Ĉielismo Wang Tianyi, Prezidanto de IKEF, anoncis aliĝon de vjetnama filio al IKEF. Vjetnama esperantistino Ĝoja Tran Hoang prelegis pri 'Per kio vjetnamoj komercas?'. Plia programero estis 'IKEF-Mongolio: Seria prezentado pri mongolaj produktaĵoj' kadre de kio s-ro Chimedtseren Enkhee, kunordiganto de la mongola filio, prezentis pri kotono el ŝtono por konstruado kaj infrastrukturo. La kompanio "Mongolbasalt" produktas kaj eksportas la materialojn al Rusio kaj Japanio. La materialo estas ne bruliĝanta en fajro.

## Nova redaktoro aŭ asistanto dezirata

Jen vasta alvoko al kapablaj esperantistoj kontribui al la pretigo de bonkvalitaj EKO-komunikoj. Ni bezonas iun aŭ iujn kun elstaraj lingvaj kapabloj, ne nepre akademianon, sed proksiman al tio. Krome estas dezirinde profunda movada kono, kun la emfazo sur landa, faka kaj loka agado kaj eventuale pri la AMO-programo. Resume, ni serĉas:

- Personon kun alta lingva nivelo kaj redakta sperto.
- Iun kun la kapablo foje kontribui koncizajn bonajn tekstojn pri preferataj temoj
- Iun kun la preteco foje redakti, koncizigi kaj poluri tekstojn akiritajn el la reto.
- Iun kun la kapablo foje labori laŭ kunpremita tempo-skalo.

EKO funkcias plene sen financa bazo, sekve ne estos kompenso en mona formo.

Antaŭdankon pro kunlaboro! Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com

========= vortoj: 750 =========

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝisla fino de majo 2021 (per EKO 2021-22). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.

Apartan dankon al Rob Moerbeek pro rapidega reago kaj livero de lingva kontrolo por ĉi tiu komuniko!

**Servo subtenata de Universala Esperanto-Asocio kaj Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj**

**ENHAVO**


- Nova Estraro de TEJO
- Marĉek por la mondo
- Kurso por afrikanoj
- ILEI tra Sud-Ameriko
- IKEF kaj Vjetnamio
- Nova redaktoro.